

Mark Fettes

Simon Fraser University, Kanado / Canada

Recenzo de la libro

Heller, M., McElhinny, B. (2017). *Language, capitalism, colonialism: Toward a critical history.* Toronto: University of Toronto Press.

Sur paĝo 126 de ĉi tiu libro aperas mia brakhorloĝo. Nu, fakte ne *mia*, sed simila produkto de la svisa firmao Movado, fotita de la svisa esperantistino Mirejo Grosjean. La foto enkondukas kelkpaĝan pritrakton de Esperanto kaj aliaj planlingvoj, per kiu la aŭtoroj – du kanadaj socilingvistoj kaj/aŭ lingvo-antropologoj – malfermas sian sondadon (en la kvara ĉapitro el ok entute) de la lingvaj dimensioj de “alternativaj modernecoj”, nome “internaciismo, komunismo kaj faŝismo”.

Tiu ĉi ekzemplo jam donas ideon pri la celoj kaj metodoj de ĉi tiu libro, kies titolo proklamas altan ambicion. Kiel historia studo, ĝi estas organizita pli-malpli kronologie en tri grandaj partoj: la epoko de la eŭropaj imperioj, de la 15-a ĝis la 19-a jarcentoj; la ekspansio de industria moderneco, en la 19-a kaj 20-a jarcentoj; kaj la postmilita epoko de usona-sovetia rivaleco, la “evoluiga” paradigmo kaj la kresko de movadoj por radikala socia reformo. Lasta ĉapitro pritraktas lingvajn aspektojn de la t.n. “malfrua kapitalismo” de la lastaj tridek jaroj.

La brakhorloĝo estas signo de la inklino de la aŭtoroj al “materia” analizo de sociaj fenomenoj. Ne temas nur pri objektoj (ili arigas interesan kolekton de fotoj tra la libro), sed ankaŭ pri konstanta atento al ekonomiaj faktoroj en la fluso kaj malfluso de diversaj prilingvaj ideoj kaj ideoj, lingvaj praktikoj kaj lingvoreĝimoj. Ne malofte ili iom devojiĝas de sia prilingva fokuso por priskribi iun aspekton de la fizikaj labor- kaj vivkondiĉoj de homoj sub “kapitalismo kaj koloniismo”, kiel diras la librotitolo. Tio estas unuflanke simpatia trajto, kiu helpas eviti ke la verko iĝu tro teoria. Aliflanke, ĝi iom nebuligas la rakonton: se ĉio homa estas iusence ankaŭ “lingva”, kiel kompreni la specifecon de la lingvo kiel studobjekto?

Tio estas fakte unu el la grandaj temoj de la libro. La aŭtoroj donas multe da atento al la evoluo de la okcidenta lingvoscienco, ekde la influo de Bibliaj interpretoj ĝis la disvolviĝo de socilingvistiko kaj la ĉomskia gramatikoteorio. En pli ol unu loko ili atentigas, kiom blankula kaj vira

estas tiu intelekta historio. Sed laŭ mi ili povus pli klare emfazi, kiel ĝuste la deziro difini la lingvon kiel “puran” studobjekton estas interplektita kun kernaj ecoj de kapitalismo kaj koloniismo, kaj do emas reenskribi je la teoria nivelo la mondrigardon de la privilegiuloj. Tiu ideo ja aperas tie kaj jene tra la libro, sed la aŭtoroj ne tiras el ĝi la logikan konkludon, nome ke la teoriaj iloj de la ĉefaj fluoj de la okcidenta lingvoscienco *ne estas adekvataj por la celoj de la libro mem.*

Tiel, ekzemple, aperas nenio en ĉi tiu libro pri literatura teorio, malgraŭ tio ke la lingva historio de kapitalismo kaj koloniismo estas plena de bataloj pri la adekvateco de lingvo por re-prezenti ties signifon por konkretaj homaj vivoj. Ekzemple, Baĥtin estas menciita, sed la signifo de la moderna romano por lia lingvoteorio estas tute preterlasita. Aperas nenio pri lingvo-filozofio, kvankam ne estas dubeble, ke kapitalismo kaj koloniismo lasis profundajn spurojn en niaj bazaj konceptoj pri la rolo de lingvo en la homa ontologio kaj epistemologio, kaj ne eblas kompreni, ekzemple, la influon de postmodernismo al nia nuntempa kulturo kaj politiko, sen baza kono de ĝia kritiko pri la nestabileco de lingvaj signifoj. Kaj tiel plu... La konceptoj pri “lingvo” en ĉi tiu libro estas bedaŭrinde limigitaj al tio, kion homoj nomantaj sin “lingvistoj” deklaris inda je atento.

Same okulfrapa estas la manko de neokcidentaj perspektivoj. Komence de ĉapitro 7 aperas foto de germana-usona pioniro de la socilingvistiko, John Gumperz, kun du bharataj kolegoj. La aŭtoroj notas, ke ili “ne sukcesis identigi” la du bharatanojn – sed fakte ili montras neniun intereson pri bharataj kontribuoj al la socilingvistiko, aŭ al lingvistiko pli vaste. Por mi mem, kiam mi sekvis doktorajn studojn en la sama universitato (Toronto) kie laboras la du aŭtoroj, tre influaj estis la brilaj verkoj de D.P. Pattanayak kaj L.M. Khubchandani pri bharata multlingveco; kial ili, aŭ aliaj pensuloj el Suda kaj Orienta Azio, ne meritis inkluzivon? Kiel eblas, ke en libro pri lingvo kaj koloniismo mankas eĉ mencio pri la kenja verkisto Ngũgĩ wa Thiong’o, fama pro sia kritika analizo de la subprema influo de la angla lingvo al la kulturo kaj memkonscio de la kenjaj popoloj? Estas vere iom konsternante, ke du socie konsciaj kleruloj, memvole elektinte verki “kritikan historion” pri la evoluo de lingvaj ideoj, praktikoj kaj esplortradicioj, havas tiel limigitan mondrigardon.

La limoj cetere videblas en tiu kelkpaĝa pritrakto de Esperanto kaj planlingvoj, kiun mi menciis komence. Ni ja ne povas atendi, ke en verko de tia amplekso, la aŭtoroj montras profundan konon de la interlingvistika literaturo. Tamen, bazaj eraroj ensteliĝis. Sur paĝo 129 ili klarigas, ke en Esperanto “ne gravas vortordo”¹, ke la verbaj sufiksoj montras la emon ligi

1 Ĉiuj tradukoj el la anglalingva originalo estas miaj.

raciecon al eŭropaj “fleksiaj” lingvoj, ke se oni parolas “la anglan aŭ germanan kaj iun latinidan lingvon, oni povas preskaŭ mem inventi Esperanton”. Tio estas jam sufiĉe malserioza priskribo. Poste ili karakterizas Idon kiel “simpligitan” formon de Esperanto, kaj sur p. 134 ni ekscias, ke “Esperanto kaj Ido ankoraŭ havas multajn [adeptojn], dividitajn precipe surbaze de ideologiaj dividoj inter politikaj kaj praktikaj celoj”. Sekvas iuj rimarkoj pri la elfaj lingvoj de Tolkien kaj la populareco de la klingona, kiujn ili same klasifikas sub “internaciaj helpilingvoj”, IAL, kvankam mi supozas ke ties lernantoj kaj parolantoj havas tute aliajn ideojn pri sia lingva hobbio.

Nu, ja. Tiaj misoj estas des pli bedaŭrindaj, ĉar la aŭtoroj havas kelkajn interesajn aferojn por diri pri la pozitiva sinteno de gravaj lingvistoj al la ideo de internacia planlingvo, kaj pri la rilato de tiuj ideoj al la kultura kaj politika kunteksto de moderniganta Eŭropo. Sed ambaŭ trajtoj fakte trakuras la libron. Je certa grado, ĝi sukcesas elvoki la grandan panoramon de lingva kaj socia evoluo, kiun oni atendus de verko kun tia titolo. Finleginte ĝin, mi havas pli klaran bildon pri la *ensocieto* de la okcidenta lingvoscienco, kaj restas impresoj pri multaj interesaj sed fragmentaj enrigardoj al ĝeneralaj evolutendencoj en “la vivo de la homa lingvo”, se oni povas esprimi la aferon tiel, tra la lastaj jarcentoj. Samtempe, ĝi estas verko tre mankohava, parte pro troa ambicio, parte pro manko de kohera analiza kadro. Restas ankoraŭ multo direnda pri kapitalismo, koloniismo, kaj iliaj sekvoj por nia lingva heredaĵo.

Pri la recenzanto

Mark Fettes estas asocia profesoro pri edukado ĉe la kanada universitato Simon Fraser. Lia doktoriĝa tezo, *The linguistic ecology of education (La lingva ekologio de edukado, 2000)*, disvolvis originalan analizon pri kelkaj aspektoj de la lingvo-evoluo en modernaj socioj. En pluraj artikoloj li esploris la signifon, revivigon kaj mastrumadon de indiĝenaj lingvoj en Kanado.

Retadreso: mtfettes@sfu.ca

ORCID-numero: 0000-0003-4147-7879

About the reviewer

Mark Fettes is an Associate Professor in the Faculty of Education, Simon Fraser University, Canada. His doctoral thesis, *The linguistic ecology of education* (2000), developed an original analysis of certain aspects of the development of language in modern societies. He has published a number

of articles on the significance, revitalization and management of Indigenous languages in Canada.

Sur l'auteur

Mark Fettes est professeur agrégé à la Faculté d'éducation de l'Université Simon Fraser, Canada. Sa thèse de doctorat, *The linguistic ecology of education* (*L'écologie linguistique de l'éducation*, 2000), a développé une analyse originale de certains aspects du développement des langues dans les sociétés modernes. Il a publié plusieurs articles sur l'importance, la revitalisation et la gestion des langues autochtones au Canada.